Komercistoj estas ĝuste kiel aliaj homoj; por konvinki ilin pri la taŭgeco de iu ajn plano nesufiĉas aserti belajn teoriojn; jam ekzistas granda kvanto da ĉiuspecaj teorioj, kaj neniu okupata komercisto povas riski tempon kaj monon elprovante projektojn. La plej bonega argumento por io ne estas **aserto**, sed **pruvo**. Se ni Esperantistoj donus tiom da tempo al **praktika pruvado**, kiom ni nun donas al kantado de "La Espero" kaj interesaj revoj, mi tute ne dubas, ke post tre mallonga tempo ni ekfarus bonajn antaŭenpaŝojn. Mi volas klarigi ĝuste kion mi deziras diri.

La plimulto el niaj aktivaj societoj (el kiuj ekzistas nun ĉirkaŭ 200), troviĝas en urbegoj ĉe kies distriktoj ekzistas miloj da firmoj kiuj rilatadas kun eksterlandaj komercistoj. La sumo de tiu interlanda transito estas apenaŭ kalkulebla; sed ĝis nun preskaŭ ĝia tuto estas kondukata nur en la nacilingvoj. Hodiaŭ la plejparto el tiuj societoj faras nenion por montri al lokalaj komercistoj la valoron de Esperanto, kaj eĉ tiuj kluboj kiuj efektive interesiĝas pri la demando, nur agas kiel izolaj grupoj, kaj iliaj sukcesoj aŭ malsukcesoj perdiĝas, aŭ almenaŭ ili tute ne utilas al la ĝenerala propagando de nia lingvo.

Por Sukcesi Ni Devus Renversi Tiun Metodon

T. e., anstataŭ dependi je sencela, spontana kaj tute hazarda metodo de propagandado inter komercistoj, niaj kluboj devus unuigi siajn fortojn por fari definitivan kaj konstantan movadon ĉe la aferuloj. Tiamaniere ni ja rajtus esperi je rezultatoj; sed sekvante la nunan sentaŭgan metodon ni nur sukcesas laĉigi nin mem, kaj ni atingas absolute nenion por Esperanto.

Mi do proponas la starigon de **Neformala Internacia Asocio**, kiu konsistos el Esperantistaj kluboj sub la aŭspicio de **Universala Esperanto-Asocio**, kiu nur celos plifaciligi la rilatojn inter komercistoj diverslandaj. Sekve, nenia organizajo estos bezonata krom la U. E. A., ĉar tio estas ankaŭ unu el la celoj de "Esperantio." Kaj ni ne forgesu, ke ju pli forte kreskas la U. E. A., ju pli fidele ni ĝin subtenas, des pli rapide kaj firme disvastiĝos nia lingvo tra la mondo. La U. E. A. estas fakte la **kerno** de la Esperanto-movado, sen kiu ni fariĝus preskaŭ senpovaj antaŭeniri; ĝi estas la baza ŝtono de nia tuta konstruajo.

Ĉiu partoprenanta klubo devus krei lokalan komitaton, kies aparta tasko estos: akurate informi pri la plej urgaj bezonoj de la lokala komercistaro; transsendi tiun informon al ĉiu "enliga" klubo en landoj de kie oni esperas aŭ povas ricevi provizon de la bezonata materialo, tiel ke la ricevantaj kluboj, siavice, povos sciigi lokalajn komercistojn pri la oportuno vendi iliajn produktajojn eksterlande. Poste, kiam la praktikeco de tiu plano estos pruvita, la "Asocio" povos entrepreni reprezenti, lokale, eksterlandajn firmojn, tiel ke ili fariĝos ne nur aĉet-agentoj, sed ankaŭ vend-agentoj. Mi citu kelkajn ekzemplojn por montri la tipon de servo al kiu mi unue aludas, kiuj okazis al mi kiel vic-delegito de U. E. A. por New York:

1e. Fabrikisto de kestoj en X. volas aĉeti proksimume 15,000 kilogramojn da najloj de Amerika firmo, ĉar li ne povas havigi tiun instrumenton en sia propra lando, kie ĉiuj firmoj servas al la registaro.

2e. Sekretario de eduka societo en Y. (neŭtrala lando) volas importi Amerikajn filmojn kaj projektorojn, kun popol-eduka celo. La valoro de tiu mendo povos ĉirkaŭi \$75,000 (Sm. 150,000).

Kaj mi povus citi similajn kazojn, kiuj videbligis la "mirindan eblecon" de Esperanto, se nur oni ĝin pli vaste uzus ĉe la komerca kampo. Se komence nur kelkaj societoj volus kunlabori tiucele, post tre mallonga tempo ni povus montri suface kontentigan liston da servoj faritaj, kaj tiaj statistikoj nepre havus pli grandan valoron inter komercistoj, ol malplenaj teorioj.

Kion pensas via klubo pri la plano? Mi sugestias, ke vi ankaŭ sendu vian opinion al la U. E. A., por ke, kiel eble plej baldaŭ, oni povos fari ion definitivan. Ni nun certe ne povas agi tro rapide. La milito estas finita, kaj **hodiaŭ** estas la plej bonega tempo por propagandi kaj uzi Esperanton. Se ni sufiĉe laboros, eble ni vidos grandan progreson eĉ dum 1919 kaj restarigon de taŭga kaj vigla "Komerca Bulteno" kiu iam multon promesis.

C. C. C.

LA ANIMO MONDA

de

Professor C. R. Skinner, Tufts College

Hodiaŭ—Nokto Kaj Ruiniĝo.

Imperioj falegas. Antikvaj Dinastioj subiĝas en brilegan ruĝon. Nekalkuleblaj ĉenoj tremas kaj tintegas ĝis tero. Neniigado, malorganizado, monda anarĥio. Vastaj etendaĵoj da torditaj ruinoj. Grandegaj bombtruoj kiuj rigardas rekte malsupren en inferon. Kaj tomboj! Dio!— Dio!— la ondegoj da tomboj ruliĝadas ĝis la horizonto kaj preter ĝi en Eternecon.

Nokto, abisma, vasta. Ĉi tiu nokto estas la nigra tombo de imperioj. Ĝi estas kosma ĉerkegujo. Ĝi estas plua afero—ĝi estas la krepusko de la dioj. La timigitaj steloj ne kuraĝas kanti.

“Kie ne estas vizio pereas la Homoj.”

Hodiaŭ—Tagiĝo kaj Espero.

Kaj tiam—super ĉi tiun dezertecon venas nova silento—la subita kvieteco de Paco. La silento fariĝas voĉa pro sentataj sed ne aŭditaj voĉoj. Ĝi estas la muziko de la sferoj, komencante nedefinite kaj tre malproksime. Ĝi estas la muziko de senkorpigintaj animoj, kiuj ŝajnas kvazaŭ naĝi al la horizonto kaj levigi simile al kreskanta sono—pli malproksima. Kaj estas maldikaj radioj da spirita tagiĝlumo similaj al tiuj, kiuj filtriĝas en la naskan ĉambron. Mirinda Lumo, proklamanta, malkaŝanta la naskon de Dio.

Kaj siluetitaj kvazaŭ nudaj arbaregaj arboj kontraŭ ĉi tiu tagiĝa lumo vidiĝas la suprenlevitaj manoj de la svarmantaj, palpe serĉantaj popolamasoj sur tero. Manradikoj sangantaj por malnovaj katenoj—manoj torditaj en la angoro de preĝo, maldikaj, malgrasegaj manoj entendantaj, moviĝemaj fingroj kiuj ŝajnas paroli universalan signan lingvon de Aspirado. Ĉiuj alvokantaj, elstreĉantaj por io—Io, kion ili ne tuŝas.

Kaj okuloj, ĉiu simila al stelo matena. Tero plena je radiantaj stelokuloj. Okuloj baptitaj de vizio belega.

La lumo venas—La vizio aperas.

“Kie estas lumo kaj vizio, tie estas Vivo.”

Morgaŭ—Tago Kaj Plenumado.

Tiam la Tago—diafaranta, rapidega—tondras super la tero.

Voĉoj—multego da langoj parolkantas en unu Universala Lingvo Peanon de amo, kiu revibras trans montojn kaj ebenajojn, kaj simile al malnova oceano ondatas sur ĉiu bordo.

Kaj la altlevitaj manoj,—ili tuŝas reciproke sin.—Ili kunpremas—ektremas—ili trovas tion, kion ili serĉas—Fratecon. Manoj kunplektitaj. Manoj de amikoj kaj malamikoj. Ili etendiĝas preter la provincaj limoj—preter nacioj. Ili zonigas la mondon. Kaj tiuj senkorpigintaj animoj—ili ankaŭ reciproke prenas la manojn, amikoj kaj malamikoj tie, kie ili falis mortantaj. Ĉie Frateco. La Demokrateco de Morto—la Demokrateco de Vivo.

Tiaj manoj kunligas la Naciojn, forĝas katenojn, kreas novan mondon.

Kaj la centro por ĉio—La Animo Monda! Ĉe ĉies koro, la korpigo de la Universalulo. La Internacia menso. La universala memo, ĉirkaŭita de tajdoj da homameco libere fluantaj kaj radiantaj la novan, la senliman amon.

Enkorpigo—Revivigo—Plenumado. **Mondo Estas Naskita!**
 “Levigu kaj brilu ĉar **cia** lumo **alvenas.**”

Esperantigis

Edward S. Payson.



LA FAJFILO

de

Benjamin Franklin

Kiam mi estis sepjara knabo, miaj amikoj, je festo, plenumis al mi la poŝojn per moneroj. Mi tuj iris al butiko kie oni vendis ludilojn infanajn: kaj ĉarmite per la sono de fajfilo, kiun posedis alia knabo, mi volonte proponis kaj donis por unu ĉiujn miajn monerojn. Mi tiam hejmen venis, kaj iradis fajfante tra la tuta domo, tre plaĉite per la fajfilo, sed maltrankviligante la tutan familion. Miaj gefratoj kaj gekuzoj, sciante la prezon kiun mi pagis, diris al mi ke mi donis por ĝi kvarope la valoron: kaŭzis al mi pensi pri la ludiloj kiujn mi povus aĉeti per la ceteraj moneroj, kaj ridis je mi tiel multe pri mia malsaĝeco, ke mi ploris pro kolero; kaj la repensado donis al mi pli da ĉagreno ol la fajfilo donis al mi plezuron.

Ĉi tiu, tamen poste estis al mi uzebla, la impresado daŭrante en la cerbo; tiel ke ofte kiam mi tentigis de io ajn nenecesa, mi diris al mi, **Ne pagu tro multe por la fajfilo**; kaj mi ŝparis la monon.

Dum mia kreskado mi opiniis ke al mi konatigis multaj, tre multaj kiu **pagis tro multe por la fajfilo**.

Kiam mi vidis iun tro ambician pri reĝa favoro, kiu oferis sian tempon, sian ripozon, sian liberecon, sian virton, kaj eble siajn amikojn **por atingi ĝin**, mi diris al mi, **ĉi tiu viro pagadas tro multe por la fajfilo**.

Kiam mi vidis alian kiu amis popularecon, kiu ĉiam enmiksigis en politikaj faradoj, kiu ne atentis siajn proprajn aferojn, kaj kiu detruis ilin per tiu neatento, **Li pagis, do**, diris mi, **tro multe por la fajfilo**.

Se mi konis avarulon, kiu forlasis ĉiun specon de komforta vivado, ĉiujn la plezurojn de bonfarado al aliaj, ĉiun la estimon de siaj kunurbanoj kaj la ĝojojn de bonvola amikeco, por ke li ebligu amasigi riĉaĵojn, **Kompatinda viro**, diris mi, **vi pagadis tro multe por la fajfilo**.

Kiam mi renkontis viron de plezuro, kiu oferis ĉiun laŭdindan plibonigadon de la cerbo aŭ de la bieno al nur korpaj sentaĵoj, kaj ruinigis al si la sanecon pro ilia ĉasado, **Trompita viro**, diris mi, **vi kaŭzas al vi dolorojn anstataŭ plezurojn; vi pagas tro multe por la fajfilo**.

Se mi vidas unu kiu amadas la bonaperon aŭ belegajn vestojn, belegajn domojn, belegajn meblojn, belegajn veturilojn, ĉiujn pli ol

siajn riĉecojn, por kiuj li faradas ŝuldojn, tiel ke lia vivado finiĝas en malliberejo, **Ho ve!** diris mi, **li estas multekoste, tre multekoste, paginta por la fajfilo.**

—El la angla tradukis, F. H. Battey.

—○—

EXTRACTS FROM A LETTER FROM FRANCE

Paris, la 12.11.18.

En tiu ĉi momento nia urbego prezentas plej frenezigan spektaklon! La plej gravaj firmoj estas fermitaj, kaj la oficistoj kaj gelaĵboristoj ne laboras. Ili promenas sur la stratoj kaj kantas iafoje plej stultajn kantojn, sed plej ofte nacian himnon. Ŝajnas, ke subite ĉiuj frenezigaĵas. Tio estas preskaŭ komprenebla, pro la longa atendo de tiu ĉi momento, sed ial la popolaj ĝojigoj neniam tre entuziasmigis min, pro la brutaleco kiun en ili mi vidas. Mi tamen nepovas diri, ke mi ne ĝojas pro la okazaĵoj, sed en ili mi vidas nur la finon de la batalado. Ĉu ĝi estis vere la lasta? Ĉu la nuntempaj diplomatoj scios eltiri el tiu teruraĵo la sekurecon por la estonto? Mi volas esperi tion.

Kiel ekzemplon de la frenezeco de miaj samurbanoj mi citos nur tion ĉi: Hieraŭ sur la grandaj bulvaroj troviĝis tia amaso, ke estis neeble marŝi, kaj ankoraŭ malpli eble veturi. Ĉiuj veturiloj devis sekvi aliajn vojojn, multe pli longajn, por fine atingi aŭ eĉ neatingi la celon! En tio tamen estis io preskaŭ amuza: la fino de la militista disciplino! Soldatoj kaptis oficiojn per la manoj kaj kuntrenis ilin en senfinan rondon. Italoj donis al britoj la ĉapon kaj oni vidis japanojn kun la franca bluhorizonta kepo, kaj la bluhorizontulojn kun la granda aŭstralia ĉapelo. Malgranda portugala oficiro havis trikoloran rubandon kiel kravaton, kaj ĉiuj portis grandajn rubandajn buklojn diverskolorajn. Kiu diros kiom da rubandoj estas venditaj kaj vendataj . . . kiom da flagoj ĉiuspecaj.

Mi renkontis britajn soldatojn, kiuj iom drinkis, pro ĝojo certe, kaj kantis: *Au revoir Paris!* . . . Unu, kiu ŝajne reiris el la fronto, kun sia tuta ŝarĝo, estis kaptita de la preterpasantoj, kaj transportita ĝis 100 metroj de tie!

—○—

HOLD YOUR LIBERTY BONDS

The owner of a Liberty Bond is the bond creditor of an honest debtor, and one who is amply able to meet its obligations—the United States.

It is poor business to exchange such a bond for stock of any sort of a speculative nature. Hold your Liberty bonds as a part of wisdom as well as a part of patriotism.

—○—

The need for a universal international tongue forces itself on people's notice. A communication calling for such a language appeared in the San Francisco Examiner for Nov. 28, and A. A. Hibbard of Reno, one of our wide-awake samideanoj, seized the opportunity to point out in the Examiner of Dec. 3 that Esperanto fills the bill.

FOR THE BEGINNER

The following questions, based on Zamenhof's Ekzercaro, are designed to bring out thru their answers the main points of Esperanto grammar and also to promote the development of a useful vocabulary. All students are invited to send us their answers, which, like the questions, must be entirely in Esperanto. Each answer must consist of a **complete sentence**; e. g. "Kio estas via metio aŭ profesio?"—"Mi estas tajloro." Replies will be classified, and mistakes corrected in this department (without, of course, mentioning names).

Demandaro

1. El kiaj parencoj konsistas via familio? Ekzemple, "Mi havas patron kaj fraton."

2. Nomu la ordinarajn bestojn en via urbo aŭ kamparo. Ĉu birdo estas besto?

3. Ĉu vi havas florgardenon aŭ potojn kun floroj en via domo? Se jes, kiajn florojn vi kulturas? Kio estas via plej amata floro?

4. La suno brilas per sia propra lumo. Per kies lumo brilas la luno? Per kies brilas la steloj? Ĉu planedo estas stelo?

5. Kiel vi fartas? Kiel fartas via familio? Ĉu trafis vin la influenco?

6. Kio estas via metio aŭ profesio?

7. La ĉielo estas blua. Kia la koloro de nematura pomo? de lakto? de krusto de pano? de karboj? de citrono? de sango? de Concord-vinberoj?

8. Kion oni faras per kraĵono aŭ plumo? Kiel oni uzas libron?

9. Ĉu via domo estas konstruita el ŝtono? el tero? se ne, el kia materialo? Kiom da frontaj fenestroj ĝi havas?

10. El anglalingvaj aŭtoroj kies verkojn vi preferas?

11. Ĉu infano estas homo?

12. Ni vidas per la okuloj. Kion ni faras per la oreloj? kion per la nazo? kion per la piedoj? Per kio ni gustumas? Per kio oni faras fizikan laboron?

13. Se malsata homo petus de vi manĝi, kion vi farus? Se mi pruntepetus de vi 1000 spesmilojn, kion vi farus?

14. Renkontante amikon sur strato vespere, kiel vi lin salutus? Per kiaj vortoj vi adiaŭsus, irante dormi?

15. Kion vi volas fari per Esperanto?

16. Kiel vi komparus Esperanton kun aliaj lingvoj rilate al facileco? rilate al esprimpovo?

17. Se du domoj estas egale grandaj, kiamaniere vi komparus ilin?

18. Kiel vi komparus Texas rilate la ceterajn ŝtatojn de Usono? kiel vi komparus Rhode Island?

19. Plenigu la jenajn frazojn per konvenaj adjektivoj:

a. Mi lavis la manojn, tial ili estas . . .

b. Mulo estas . . . besto; ĝi stariĝas kaj ne volas sin movi.

c. Tiu viando tute ne estas . . . ; ĝi malbonodoras.

- d. . . . tranĉilo facile tranĉas.
 e. La luna nokto estis tiel . . . , ke mi povis vidi sufiĉe por legi.
 f. Vi havas tre . . . vizaĝon; ĉu vi estis malsana?
 g. Tiuj arboj estas ankoraŭ tro . . . por doni fruktojn.
 h. Ni venkis tial, ke ni havis . . . armeon.
 i. Mi amas la . . . infanojn: en la lernejo ili estas . . .
 j. La homoj, kiuj estas . . . ' ne faras erarojn.
 k. La muziko estis tiel . . . , ke ni havis tre . . . vesperon.



BEST TRANSLATION FROM SEPTEMBER NUMBER

Ne nure alfarebla, sed speciale konvenebla estas Esperanto por kantado. La bonsonaj klaraj vokaloj tre similas la italan lingvon, kaj ekzistas en la du lingvoj multe da vortoj kiuj havas samecon tre identan. Plie, en Esperanto troviĝas granda diverseco rilate al versmetro kaj poezia stilo, pri kio la libereco de vortuzado kaj la eligo de vokaloj permesata sub kelkaj kondiĉoj, estas efektiva helpilo. Multe da bonekonataj kantoj diverslandaj oni tradukis en la lingvon, kaj troviĝas kreskiĝa alprovizo da Esperanta poeziaĵo originala. Oni do rekomendas, ke kantantoj aldonu al sia kantaro Esperantajn kantojn, kaj estas certe, ke post nelonge, ne sole ili, sed iliaj aŭdantaroj altetaksos la muzikajn ĉarmojn de la lingvo internacia.

W. H. Smith, Tradukis.

Concord, N. H.



FOR THE ESPERANTO STUDENT

(The best translation received of the following exercise will appear in the January issue of *Amerika Esperantisto*. Papers must be sent before the thirtieth of December in order to receive consideration.)

Exercise for Translation

The majority of teachers and educationalists have not, as yet, seriously examined Esperanto or the question of its adoption as a school subject. Esperantists, however, contend that the benefits which would accrue from a universal knowledge of the language make its general introduction into the schools of the civilized world extremely desirable. It may in this connection again be pointed out that Esperanto is not a mere theoretical project, but a living language, and that the educationalist must therefore consider it from this point of view. Furthermore, it is already taught in a large number of schools—elementary, secondary, technical, commercial and military—in various countries and thruout the world; in many cases under the auspices of Government Departments and local authorities.

We have received at this office a number of Esperanto and other periodicals, not hitherto acknowledged, in which we note valuable articles on the following (those in Esperanto in bold type).

Espero (Scand.)—Aug.—**Congress at Goteborg.**

Esperanto (Bahia Blanca)—Oct.—Proposal for an understanding and the federation and distributed effort between the three Esperanto journals of Argentina.

Oficiala Bulteno Tutruslanda Fed.—March, 1918—Summary of society activities.

Kataluna Bulteno—May—Esperanto teaching in the schools (Antido's word structure enclosed).

Holanda Pioniro—Sept.—Oct.—**Postal checks and money orders.** Esperanto in the Netherlands Chronicle.

Boston Ideas—Nov. 2 and 9—Spiritualism, Woman's Suffrage, etc.

Equitist—Nov. 15—Single Tax, Labor Dollar, etc.

American Economist—Nov. 15—Protective Tariff.

Light—World Peace Association.

The World (Japan) Salesman—Oct.—Furs in Argentina. Japan winning Ceylon Trade. India's Industrial Development. Mexican Trade. Commercial Esperanto.

From the Norwegian Esperantist League comes a booklet by Bruno Rifling entitled Esperanto i 10 Lektioner (not a la Carte). It is a valuable and comprehensive summary of Esperanto for those who speak the tongue of the land of the Vikings. Price, 20 oere. Incidentally we desire to compliment the Press of Aas and Wahl on their clear cut and beautiful workmanship.

We have received from England a copy of Hawthorne's Great Stone Face in Esperanto, an excellent short story for the student. We hope this will shortly be in stock.

S-ro Fernandes of Rio de Janeiro has published Zamenhof's Proverbs with the nearest Brazilian equivalents, "Frazologio Proverbaro."

The Gregg Shorthand Company have published an adaptation to Esperanto to get ready for the new day.

We have received for review from the Tenrindo Press of Kyoto, Japan, a small pamphlet entitled "Esperanto Slosilo." What we received is a twenty-page booklet containing the grammar in full and examples of the affixes of Esperanto, which must be a very handy little booklet for any Japanese Esperantists. **We suppose** that it is intended to include the customary alphabetical list of Esperanto roots so as to be of use as a key for letters from the outside world by the **non-Esperantist** in Japan; if not, we must protest against the use of the term "Slosilo." The term has acquired a definite meaning which should be adhered to, especially when any foreign purchases are expected. Of course it is possible to find courteous Esperantists in every part of Japan who would gladly translate even a business letter, but that is not to the point; a "key" to the Esperantist means direct touch

with his correspondent. In the absence of a knowledge of Japanese, the reviewer is unable to attest the intent of the publishers, the difficulties in the way, nor even the accuracy of the Japanese translations. The key—with the addition of a small vocabulary—will undoubtedly mean a great deal of international business, and a great furtherance of our language.



We have lately lost one of the constant samideanoj in Mrs. Lewis B. Lueders of Philadelphia, who died of pneumonia on the way over seas in the Y. M. C. A. service. Her late husband was one of the earliest Esperantists and their union was due to a meeting at an Esperanto Congress.

Are all New Yorkers camera fiends? S-ro Armand B. Coigne and his mother on a vacation trip called at the West Newton office and took a foto of our front windows, "the great unwashed."

Miss Cora L. Butler of Port Richmond, New York, writes us, "I have heard of four people who really **want** to study Esperanto. I have done quite a lot of propaganda work in the last ten years, but in all that time I have never had four people come to me of their own accord in one month."

Boston has had her Esperanto clubroom open every Tuesday despite the raging epidemic, and had a social reunion December 3. Mr. Lee, Mr. Payson, and Mr. Frost spoke.

We are ready when the year ends to open at least two pages of the magazine to a free forum for **signed** articles in **Esperanto only**, advocating any world objects. If you wish to place other propaganda before our readers in brief form, here is an opportunity. Preference will be given to the more concise, no article should exceed 500 words, new subjects to be preferred, anything bitter or denunciatory or advertising will be refused space, also anything that is in conflict with the intent of the society, to further Esperanto. Thru our foreign exchanges this means an opportunity to reach a wide circle of progressive readers everywhere.

We hope to find material in the near future for two numbers of special appeal, one on Esperanto and the Schools, the other on Games for Esperantists. If you have any suggestions as to methods of teaching Esperanto either in school or by use of games, we would like them sent in. Complete rules for games are needed, preferably in Esperanto.

The next number will be devoted to propaganda and will be entirely—or nearly so—in Esperanto.

The abrupt termination of hostilities has rather interfered with our plan for the great speeches tho we expect that one—the more noteworthy—is to come. Watch for it and we'll try to have the translation while it is still news. Should anyone desire the Esperanto of Wilson's 14 points he will find them in the "November 1917" number.

An armistice has been signed. Can we have permanent peace without Esperanto? Don't let the present days of glory slip by without doing something for Esperanto.

TWENTY-FOUR LANGUAGES REQUIRED IN THE PEACE NEGOTIATIONS

Paris, Dec. 5, 1918.

Translators in 23 languages have been called for by Brig. Gen. William W. Harts, who is directing the equipment of the American peace delegates.

The full list of languages comprises French, Italian, Greek, Japanese, Spanish, Montenegrin, Norwegian, Bulgarian, German, Hungarian, Turkish, Chinese, Portuguese, Polish, Swedish, Persian, Russian, Serbian, Armenian, Czech, Rumanian, Danish and Arabic. This with English makes a quota of 24.

Why not subtract 23 and add 1—Esperanto?

—o—

We hope every Esperantist knows that the association and the magazine are still alive. When a live propagandizing Esperantist in a suburb of Boston doesn't know it and still keeps on fighting for the cause, isn't it time some of our readers hunt up a few former samideanoj and tell them so.

In Queensland, Australia, a proposal is pending to make Esperanto compulsory in the state schools.

PLEASE DROP ME A LINE IF YOU ARE INTERESTED IN THE COMMERCIAL USE OF ESPERANTO.
C. C. Coigne - - 2633 Creston Avenue, New York City

“THE WORLD SALESMAN”

(Grown out of the *Japan Salesman*)

A Monthly Commercial Review, published in Yokohama, Japan, by an American concern.

THE WORLD SALESMAN is the first commercial journal to have drawn attention to the value of Esperanto as the common commercial language. It has regular articles on Esperanto, and publishes the names of firms using the international language.

It will keep you posted on World Trade. If you want to do business with the Far East or any other section, IT WILL PAY YOU TO ADVERTISE IN THE WORLD SALESMAN.

Advertising Rates on application. Subscription, \$5.00 for two years.

HEAD OFFICE : 51, YAMASHITACHO, YOKOHAMA, JAPAN.
NEW YORK OFFICE : SINGER BUILDING.
